# L'ALVOKO

OFICIALA ORGANO
DE LA
KEBEKA ESPERANTO-KLUBO

NUMERO 8

15-an de Marto 1963

## ATENTU... ATENTU...

Jam unu jaro forpasis depost la organizo de nia grupo. Mi emas kredi tiun periodon sukcesplena, dank' al sindonema laborado de niaj instruistoj kaj estraranoj. Denove tiu ĉi jare ni devos elekti novan estraron. Estus dizirinde, ke la plej kapablaj, el tiuj sufiĉe liberaj, estu elektotaj.

Ankaŭ ni devas pripensi, ke ne nur gravas taŭga estraro, sed ankaŭ grupo sufiĉe multnombra. Tial mi nur aldonas: antaŭen la propagando!

S-ino Yvette Doré, Prez-ino de K.E.K.

## DANKON AL LA KEBEKA KLUBO

Tutkoran dankon al la Kebeka Klubo, pro la distravespero organizita okaze de la karnavalekskurso de la Tririveranoj. Ankaŭ dankemaj estas la ludgajnintoj pro la belegaj donacoj ricevitaj. Estas speciale menciinda la bela muziko per kiu S-ro Doré agrabligis la feston.

Tiej kunvenoj sendube kontribuos al plifortiĝo de nia movado. Espereble, la venontan 31-an, ni havos la plezuron gastigi niavice multnombrajn Kebekanojn okaze de nia sukerfesto.

Gis la revido.

La samideanoj el Trois-Rivières.

S-ino Thérèse Héroux

# FILIPINOJ KAJ HAVAYO

de- S-ino Hardouin.

Pro tumulto en Kambogo, ni ne povas iri en tiu lando, ni iras al la Filipinoj, situanta inter la Pacifika Oceano kaj la Maro Ĉinujo. La lando konservas komercajn rilatojn kun Azia lando ek de jarcentoj.

Filipinoj estas poliglotaj. La "tagolag" estas la nacia lingvo. Manilo estas bela granda urbo kun ĝia Nacia Muzeo, la Arta Galerio de la Universito, ĝiaj monumentoj, modernaj hoteloj kaj ĝiaj ĉinaj, hispanaj, europaj, filipinaj restoracioj, kiuj prezentas al la vizitantoj la plej delicajn manĝajojn.

Ni faras ekskurson al la Lago Taal, al Tagaytay, dumil ducent kvindek futojn alta. Oni trovas volkaneton en, kiu insuleto eliras de la kratero pro erupto en 1911, tio faras fenomenon.

Ni vizitas la malgrandan preĝejon "Las Pinas" konstruita en la jaro 1762, kun ĝia orgeno de bambuo, unika en la tuta mondo. La konstruo estis komencita en 1818 de unu Patro Recollet kaj finita en 1822. Gi estis difectita du ĝojojn pro tertremo kaj tropika ŝtormo. La naŭcent kvindek bambuoj, kiuj konsistas la orgenon estis enterigataj ses monatojn en la sablmaro por antaŭgardi ilin kontraŭ pentatomoj el bambuoj. La sonoro estas benega.

Ni vizitas la fuorton Santiago, kie estis mortintaj filipinoj pro la atako de la japanoj en la jaro 1945. Ili amasigis sin en tiu fuoto, torturis, ilin kaj mortigis ilin. Nia gvidisto travidis tiun tempon de milito kaj povis paroli libere pri tio. Ni iras vidi la monumenton de la mortintoj, ĝie estas surskribitaj tridek ses mil nomojn de amerikanoj kaj filipinoj. Ni haltas ankaŭ ĉe la tombejo kun dekok mil epitafoj el blanka marmoro importitaj de Italuyo. Ciuj homoj mortiĝis pro la milito de 1945. Vere impresa. La vetero estas varma (80.f) Tie, la monunuo estas la peso.

La filipinoj estas kultuhavaj, gentilaj en tiu gastama lando. Manilo plaĉas multe al la fremdulo.

Ni estas en la lasta etapo de nia vojaĝo, ni foriras, ĉiam per aviadilo, al Honolulu, en Havajo insulo. Ni haltas en Guam kaj Wake, du insuloj en la Pacifiko. Honolulu situiis enla insulo "Oahu" kun ĝia fama sablbordo Waikiki kaj la terkapo "Diamanto Kapo". (Diamond Head).

La sablobordoj, tropikaj floroj, dancoj "hula" fiskapto en alta maro, akvoskio igas ĝin la revaurbon por la turistoj.

La vetero estas ideala dum la tuta jaro. Pro amerikanigita stato, Honolulu perdas iom de sia polinezia ĉarmo.

La grandegaj ananasujoj estas vivindaj kaj manĝi ananasoj estas delico. Ni iras en ekskurso sur la monton Tanĥalus kie oni havas splendora vido de la urbo, kaj al la tombejo Punchbowl Memorial, kie mortis miloj da homoj la 7 an de decembro 1941 pro la atako de la Japanoj, en Pearl Harbour.

Ni prenas la jakton Adventure, ni ĉirkaŭiras la insulon Ford situanta golfo nomita Pearl Harbour, kiu estas la plej granda el la militŝipaj bazoj en la tuta mondo. Ni vidas multe da destrojeroj, krezŝipoj, kpt, kpt. Tie oni ne malpermesas foti. El ŝipoj sinkitaj aŭ difektikaj, nur dextri estis riparitaj, krom Utah kaj Arizona ne reflorigitaj. Trimil sesdek sep amerikanoj alkomanditaj perdis la vivon en tiu bazo. Ni revenas al Honolulu kun amareco pro la aŭtentika rakonto de Pearl Harbour.

Ni havas liberan tagon por ripozi kaj profiti de la Waikikia bordo antaŭ repreni la aviadilon por Vankuvero kaj Montrealo.

La vojaĝo finiĝas kun agrablaj memoroj kaj granda feliĉeco post 30,000 en aviadilo.

= Mi foruzis multajn rulojn da kolorfilmo kaj revenis kun kolorplenaj diapositivoj, kiujn mi povas montri kiam la amikoj deziros vidi ilin.

F I N O

<u>AKROSTIKA PROBLEMO</u>

Se vi trovos la solvon de ĉiu linio, vi trovos - akrostike - la nomon de s-ino esperantistino de nia K.E.K. La punktoj indikas la kvanton de literoj en ĉiu vorto.

| | |
|---|---|
| 1.- . . . | (posteulo) |
| 2.- . . . . | (ĝojigas la koron de homo) |
| 3.- . . . . . | (tiun fari estas homa) |
| 4.- . . . . . . | (li ofte transloĝiĝas) |
| 5.- . . . . . . . | (fama datreveno) |
| 6.- . . . . . . . | (ĝia felo estas ŝatata; ia rato) |
| 7.- . . . . . . | (fremda monero aŭ ora mono) |
| 8.- . . . . . | (de temp' al tempo) |
| 9.- . . . . | (Adamo havis unu superfluan) |
| 10.- . . . | (periodo) |

K.E.Klubano

# LEONARDO DE VINCI

(1452 - 1519)  de: Frato Vianney, f.c.

Oni certe rimarkis en la ĵurnaloj la ektumulton pri la eniro pruntedono de la fama pentra verko Mona Lisa en la Usonon. Ĝi okazis en finnovembro. André Malraux, arthistoriisto kaj francministro, venis samtempe por prezenti la neforgesindan "Joconde". Permesu tiujn neperferktajn liniojn por precipe paroli pri la aŭtoro de tiu majstroverko.

Fakte, inter la famegaj nomoj de la Renaskiĝinta Epoko, mi ĉiam konservis tiun de Leonardo de Vinci, tiom pro lia universa genio, kiom pro liaj mirindaj petraĵoj. Skulptisto, pentristo, arkitekto kaj ingenioro, li distingiĝis ankaŭ pro siaj improvizitaj kantetoj kaj siaj akompanaĵoj sur la liuto. Lerta verkisto, scenmeĥisto, geologo, botanisto, estas apenaŭ kredeble, ke unu homo povis valoriĝi en tiom da sciencaj kaj artaj temoj. Oni diris eĉ, ke li antaŭvidis la fenomenon de la sangcirkulado, la leĝon de inerteco, la kameron, la aviadilon kaj la submarinon. Do li restas por ni unu el la plej misteraj personoj en tiu moviĝanta periodo. Ni vidu mal longe kelkajn fazojn kaj verkojn de tiu granda estulo.

Leonardo naskiĝis en Vinci, je la dek-kvina de aprilo, 1452, el Piero d'Antonio kaj el fraŭlino en tiu vilaĝo, nur konata per ŝia antaŭnomo Caterina. La knabo, tre inteligenta, ne havis multan intereson por la studado. Li ŝatis vagadi, promenadi en la kamparo, el kie li kunportis en siam ĉambron ĉiajn plantojn, kiujn li plaĉiĝis observi. De lia infanaĝo, Leonardo estis studenta la pentrarton kun la fama majstro Andrea del Verocchio. Kiam li estas ĉirkaŭ dudekjara, li forlasas tiun pentran lernejon. Dum kelkaj jaroj, li estas ingenioro ĉe Le Caire, en Egiptujo. En 1483, nia artisto proponas sian helpon al la duko Ludoviko sforza, en Italujo, pri diversaj laboroj, en kiuj li povus esti utila. En longa kaj bone redaktita letero, la aspiranto citas siajn kapablaĵojn; kaj ĉi-tiujn oni kredus mensogegojn, se ili ne estus kontrolitaj per iuj observaĵoj.

Inter tiuj ebloj, ni citu hazarde: li povas fabriki tre malpezajn pontetojn, sekigi riveretojn, fari diversajn militajn pontojn, prepari transportfacilajn bombetojn, konstrui katapultojn kaj balistojn, kaj kontraubombetajn ŝipojn; li estas ankaŭ arkitekto por tiaj domoj; li povas fari terajn, marbrajn kaj bronzajn skulptverkojn. En pentrarto, li povas plenumi ĉiajn demandojn.

Vivinte en malordaj tempoj, en mezo de senfinaj militoj, en la jaroj de Sforza, de Cesare Borgio, kaj de Savonarole, li sciis benkondukti sian kreantan genion. Poeta kaj artista animo, kontemplanta kaj revanta, Leonardo estis brila observinto, sed el liaj sciencaj kaj militaj eltrovaĵoj, restis ĝis ni preskaŭ nenio; li eĉ lasis por la postepoko nur malmultajn pentrajn verkojn, por remimorigi lian nomon. Tamen, inter ĉiuj liaj agaĵoj, estas en ĉi-tiu vidpunkto, ke li kaptis la atenton kaj la admiron de la homaro. De post

la malkvieta simpleco de la Joconde al la unuiĝanta malsimpleco de la CENE, kiom da dekstreco, kiom da genio! Kiom da dolĉeco en tiuj personoj simetrie sidataj en natura kadro. La perfekteco de lia pentraĵoj nin permeses sin demandi kian perfekton li havus ĝodiau kun rimedoj multe pli perfektigitaj.

Iu historiografisto de lia epoko. Vasari, skribis pri li: "Li desegnis multe lau la naturo. ... Li desegnis zorge brospinte per malmulta blankaĵo kaj nigraĵo tiujn studojn kiujn faris admire." Jen kelkajn titolojn inter liaj pentraj ĉefverkoj. Post la verknomo, la numero indikas la lataĵon de la verko kaj la nomon de la posedanto.

L'Annonciation - 38.5" - Florence, Galerie Uffizi;
Le Baptême du Christ - 69.5" - Florence, Galerie Uffizi (parto de la pentraĵo pentrita de Leonardo);
L'Adoration des Mages - 95.655 - Florence, Galerie Uffizi;
La Vierge des Rochers - 78.5" - unu en Londres, alia en Louvres;
Ginevra de ' Benci - 16.5" - Milan, Ambrosienne;
Le Musidien - 17" - Le Prince de Liechtenstein;
La Cène - 165.25" - Milan, Ste-Marie-des-Grâces;
Mona Lisa (Joconde) - 30.25" - Louvre;
La Vierge et l'Enfant avec Sainte Anne - 66.875" - Louvre;
Saint-Jean-Baptiste - 27.5" - Louvre.

(Estus tre interese studi kun detaloj kelkajn verkojn, sed tio ne estas mia celo.)

Mi do invitas vin legi pri speciale la Cène kaj la Joconde rigardante la bildojn samtempe, oni trovas multajn impresojn, kiujn vortoj ne povas ekspresi. Fine, permesu al mi ĉi-tiujn pensojn de Taine, pri tiu rimarkinda genio: "Tiu viro estas la plej profunda kaj la plej pensema inter la pentro-verkistoj: finage pensulo, kiu havas scivolojn, kapricojn, delikataĵojn, grandegaĵojn, malgajaĵojn, supre ĉiuj samepokuloj. Neinteresata, en kiu sufiĉis por la memestimo de la plej ambicia genio, ĉiam provante sin preterpasi por pliiĝi siajn inventaĵoj, kiel ŝipisto, kiu, malatentante la sukceson, forgesante la eblon, eniras nekontraustareble en la mondon de la nekonata kaj senlimo".

- - - - - - - - - - - - - -

## Sercoj

A- Oni diras ke karotoj estas bonaj por la okuloj.

B- Jes, kaj kial?

A- Car la kunikloj manĝas karotojn, kaj vi neniam vidis kuniklojn kun okulvitroj.

- - - - - - - - - - -

# KRUCVORTENIGMO

De: Vincent Beaupré.

## HORIZONTALE

1- Mezurunuo de intenseco de elektra fluo (apost..) - Ĥemia elemento.
2- Broŝurita Paper foliaro - Organo de aŭdkapablo.
3- Nedifina adjektivo - Sufikso - Sufikso (inverse) - En ŝuo.
4- Polusa birdo - Objekto.
5- Viro, kiu devenas de la antikvaj Hebreoj - Aŭdigi mallaŭtajn ripetitajn krietojn (apost...) - Larĝa Japana Zono, uzata ĉefe kiel virina ornamaĵo.
6- En Geologio.
7- Centroj de supera instruado.
8- Antaŭa pinta korna ekstremaĵo de la buŝo de la birdoj (AK).
9- Manĝebla Riverfiŝo (Apost...) - En Biologio - Bulgaria mono (inv)
10- Floreto - Kolekti provizon de Mono
11- Nikolai Nikolaievicn - Sufikso - Amelia Earhart - Phineas Barnum.
12- Provize - Skue -
13- Taskon - Aventuru

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | A | M | P | E | R | ■ | | ■ | I | O | D | I | O |
| 2 | L | I | B | R | O | ■ | | ■ | O | R | E | L | O |
| 3 | I | A | ■ | I | L | ■ | | ■ | M | E | ■ | U | O |
| 4 | A | U | L | K | O | ■ | | ■ | A | F | E | R | O |
| 5 | J | U | D | O | ■ | P | I | P | ■ | O | N | B | O |
| 6 | ■ | ■ | ■ | ■ | G | E | O | L | O | ■ | ■ | ■ | ■ |
| 7 | U | N | I | V | E | R | S | I | T | A | T | O | J |
| 8 | ■ | ■ | ■ | ■ | B | E | K | O | N | ■ | ■ | ■ | ■ |
| 9 | E | Z | O | K | ■ | I | O | L | ■ | O | V | E | L |
| 10 | V | I | O | L | O | ■ | P | ■ | Ŝ | P | A | R | [illegible] |
| 11 | N | N | ■ | O | P | ■ | O | ■ | A | E | ■ | P | B |
| 12 | E | K | I | P | E | ■ | J | ■ | T | R | E | M | E |
| 13 | R | O | L | O | N | ■ | N | ■ | U | K | S | I | U |

## VERTIKALE

1- Malsamaj - En renversi (inverse) - 2 - Bleku kiel kato - Bluegriza meta lo
3- Paul Bunyan - Louis Daguerre - Du similaj vokaloj - sufikso.
4- Arbeto el la familio de erikacoj - En klopodi.
5- Tasko - General Edward Braddock - Nepo de la nepo (inverse)
6- Sinki - 7 - Optikajn instrumentojn - 8 - Vortetoj de la komparativa formo.
9- Nedifinita Kvanto-O.T.N. - Estimu.
10- Unu el la kvar koloroj de ludkartoj - Ŝtofo (inverse).
11- Prefikso- adverbo (inverse) - En varii- Edgar Saltus.
12- Konsumiĝi per fajro (inverse) En impreso (inverse)
13- Kvin "O" - Ne submetita al fremda volo (Apost...)




## SOLVO DE LA ANTAUE PROBLEMO

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 | 13 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | F | O | S | I | ■ | Ŝ | U | O | ■ | Ĉ | A | S | I |
| 2 | A | V | O | ■ | Ĉ | I | E | L | O | ■ | R | E | N |
| 3 | K | O | ■ | L | I | A | ■ | U | N | U | ■ | D | G |
| 4 | O | ■ | I | ■ | E | ■ | I | ■ | O | ■ | G | ■ | O |
| 5 | ■ | A | Ĝ | O | ■ | R | E | I | ■ | A | I | Ĉ | ■ |
| 6 | A | M | I | ■ | Ĉ | A | S | T | A | ■ | N | I | A |
| 7 | M | O | ■ | S | E | D | ■ | S | T | I | ■ | A | R |
| 8 | I | R | I | ■ | S | I | G | N | O | ■ | I | M | O |
| 9 | ■ | I | S | M | ■ | O | N | I | ■ | O | N | A | ■ |
| 10 | Ĝ | ■ | T | ■ | P | ■ | I | ■ | U | ■ | A | ■ | V |
| 11 | I | G | ■ | L | A | Ŭ | ■ | A | M | U | ■ | D | O |
| 12 | B | A | N | ■ | F | A | J | F | I | ■ | M | O | L |
| 13 | A | B | I | O | ■ | N | E | I | ■ | S | U | M | I |